

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo/Majo 1981



33a IFEF-Kongreso en Regensburg

15a ĝis 21a de Majo 1981



179 CASTRA REGINA
1135 Sona Ponto
1290 Sankta Petro-Katedralo



eldonkvanto 5000

Dieser Sonderumschlag wird in Regensburg angeboten.

Regensburg antaŭ ni

Ho leganto, kiu ĵus legis la ĉi-supran titolon kaj kiu rigardis la foton de la kongresa specialkoverto, ĝoju, se vi havas la bonŝancon veni al la ĉi-jara manifestacio de la fervojistaj esperantistoj, ploru, se la sorto tion ne permesas al vi. Ĉar ĉion, kion ni povis realigi el la provizo de niaj ideoj kaj laŭ la amplekso de niaj rimedoj, tion ni intencas surtabligi al vi dum tiu kongresa semajno. Jes, unuavide la kongresprogramo aspektas kiel ni konas ĝin de jaroj kun la kutimaj laborkunsidoj, inaŭguro, fakprelego, balo ktp. Sed se vi, ĉu atendante la kongreson aŭ ne, iom pli ekzakte esploras la programerojn, vi malkovros tion kaj tion, kio en pli fruaj kongresoj ne ekzistis.

Ekzemple, kiel vi jam povis legi alialoke en BULTENO, la kongresejo disponis pri propra sendstacio, kiun funkciigos niaj amikoj de la fervojistaj radio-amatoroj. Per ĝi ni esperas povi informi vastan rondon da homoj en ĉiuj kontinentoj pri la kongresaj faktoj kaj pri la vivo de la kongresanoj. Kaj niaj gastoj eĉ havos la eblecon, ĉeesti dum la funkciado de la sendstacio.

Alia nova ideo, kiun LKK lanĉos dum la 33a, estos Literatura Konkurso. Ne ĝenerala, kiel konata el Universalaj Kongresoj, sed speciala. La kontribuaĵoj estas limigitaj je temo „fervojo“. Kial, LKK demandis sin, oni ne trovu sufiĉe da kapabluloj kaj interesuloj inter la fervojistoj aŭ ektere de ili, kiuj volonte traktus tiun temon. Ŝajnas, ke la alta nombro da ensendaĵoj pravigas nian kuraĝon.

Plua interesa programero, kiu antaŭvideble realiĝos, estos ja ne tute nova, tamen nur unufoje ĝis nun okazis: la kongresanoj, honoraj gastoj, ĵurnalistoj povos admiri la belan spektaklon de uniformigitaj gekolegaj el ĉirkaŭ 14 eŭropaj fervojoj. Certe fariĝos frandaĵo por centoj da fotoaparatoj.

En la vesperaj programoj ni klopodis trovi ion, kio ne tro ofte estas prezentita en IFEF-kongreso. Tial ni ofertas en la plej malnova preĝejo de Regensburg kant- kaj koncertvesperon sub la devizo „De l' mezepoko ĝis la nuntempo“. Aliaj

vesperon la famkonata Magiisto kun la Blua Ŝtono „Trixini“ zorgos pri la bonfarto de niaj kravatoj kaj plenigos kuniklostalojn. Jam nun ni antaŭvidas amuzan vesperon.

La speciala poŝtofacejo dum tri tagoj deĵoranta entute 15 horojn certe ne nur kontentigos la kongresanojn per belaj markoj kaj kompreneble speciala stampo, sed ankaŭ en kaj ekstere de la kongresloko zorgos, ke la kongreso estos diskonigata al la vasta publiko. Ĉi-riilate ankaŭ efikos informstano, kiun LKK starigos sabaton kaj lundon en la zono por piedirantoj, kaj tie buŝe kaj per flugfolioj ni informos la publikon pri la Internacia Lingvo.

Fine estu menciata io, kio kutime ne eblas dum kongresa ekskurso: Sur la danuba ŝipo, kiun ni frekventos 4 horojn, oni povos aĉeti varojn laŭ similaj kondiĉoj kiel ekz. sur la ŝipoj de la „Birdfluglinio“ inter Danio kaj Germanio, do sen impostoj.

Tiu ĉi lasta superrigardo sufiĉu por pravigi la unuan frazon. Venu, estu niaj gastoj kaj bonsentu en la 33a.

LKK Regensburg

Ekzameno en Regensburg

En la kadro de la 33a IFEF-Kongreso okazos ekzameno de la Germana Esperanto-Instituto pri lingva kapableco, kiu estis anoncita nur por germanlingvanoj. La Germana Esperanto-Instituto intertempe starigis ankaŭ unulingvan ekzamenon pri lingva kapableco **nur en Esperanto**. La fervojista ekzamena komisiono ofertas tiun ekzamenon al ĉiuj gepartoprenantoj de la 33a IFEF-Kongreso je la jenaj provizoraj tempoj: Skriba parto lundon 18an de Majo 9.00 h, buŝa parto merkredon 20an de Majo 9.00 h.

Volonte donas informojn kaj akceptas aliĝojn: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, D-6400 Fulda (deĵoradreso: Bahnhof Fulda).

33. IFEF-Kongreß in Regensburg (15. — 21. Mai 1981)

Nur noch wenige Wochen liegen vor dem

Beginn des 33. IFEF-Kongresses, der nach dem geplanten Programm und nach der erstaunlich hohen Zahl an Anmeldungen das herausragende Jahresereignis der Eisenbahner-Esperantisten und vieler sonstiger Gäste sein wird. Den deutschen Teilnehmern bietet sich eine einzigartige Gelegenheit zur Teilnahme an dieser internationalen Veranstaltung im eigenen Land. Das Programm ist noch reichhaltiger, als es in den bisherigen Veröffentlichungen vorgestellt wurde. Im Herbst 1981 wird übrigens keine Jahresversammlung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten stattfinden.

Wie bereits bekanntgegeben wurde, können Interessenten den Kongreß auch nur an einzelnen Tagen besuchen. Wir bitten jedoch um Verständnis, daß der Besuch bestimmter Veranstaltungen für diesen Personenkreis nur gegen Lösen einer sogenannten Tageskarte möglich ist. Übernachtungsmöglichkeit und die Teil-

22a IFES en Jugoslavio

Celo por pli ol cent partoprenantoj el dek landoj estis la 7an de Februaro la Juliaj Alpoj, tie la lago de Bohinj kun la apuda hotelo Bellevue, por ĉeesti la 22an Internacian Fervojistan Esperanto-Ski-semajnon, kiun organizis JAFE, precipe Jovan Mirkoviĉ. Ne ĉiuj loĝis en la hotelo mem, iuj en kromdomo kelkajn paŝojn apude. La ĉambroj tie estis eĉ pli modernaj ĉar pli novaj, tamen en ambaŭ domoj ĉiuj ĉambroj havis duŝon kaj propran necesejon; ankaŭ la hejtilaro bone funkciis. Dum tri vesperoj bonega muzikistaro ludis kaj kantis tiel vervritme, ke la piedoj de si mem komencis moviĝi . . .

La tagmanĝon oni ricevis de la 12a ĝis la 16a horo — ege taŭga solvo por nelacigeblaj skiantoj. Laŭvole oni povis ankaŭ ricevi lunĉpakajeton anstataŭ tagmanĝo, aŭ kuponon por tagmanĝi en hotelo meze sur la ideala skitereno de monto „Vogel“; sed tio nur efektivigis dum la lastaj du tagoj, ĉar antaŭe oni kontroladis kaj riparis la gondolan telferon tie, kaj nur per ĝi oni povis atingi la pli supran liftaron de la skitereno. Antaŭe, de dimanĉo ĝis merkredo, aŭtobusoj ĉiuhore ekveturis ĝuste antaŭ la hotelo por transporti la skiantojn al la

naĵo an den Ausflügen kann nicht zugesichert werden.

Die Schlußveranstaltung am 21. Mai wird so rechtzeitig beendet sein, daß der Schnellzug „Johann Strauß“ in Richtung Würzburg/Frankfurt (M), Regensburg ab 18.13 Uhr, noch erreicht werden kann. Vorherige Platzreservierung wird empfohlen. Wer noch früher abreisen möchte, braucht auf den Ausflug nach Kelheim nicht zu verzichten, muß jedoch nach dem gemeinsamen Mittagessen in Kelheim auf eigene Kosten nach Regensburg zurückreisen. Ankunft in Regensburg Hbf um 14.56 Uhr.

Das Tagungsbüro in Regensburg ist vom 14. bis 22. Mai unter der Fernsprechnummer (09 41) 5 37 70 zu erreichen. Auf baldiges Wiedersehen in Regensburg!

**Örtliches Kongreßkomitee
des 33. IFEF-Kongresses**

malpli alta skitereno „Kobla“, sed ankaŭ tie estis ebleco por ĉiuspeca vintroporto.

La vesperaj programoj estis tre variaj. Unualoke mi menciis diaprezentado pri montgrimpa ekspedicio al Mount Everest far de aktiva partopreninto, kiu tamen mem ne ĝisatingis la pinton, ĉar li frostvundiĝis 400 metrojn sub la celo . . . Ni ĉiuj kunsentis la dolorojn, la rezignacion liajn.

Folkloro vespero estis alia programero. Aŭtobuso transportis nin en du grupoj al la urbeto Bohinska Bistrica, kie la vigla folkloro grupo **Tine Rožanc** el Ljubljana en ĉiam novaj kostumoj prezentadis dancojn el diversaj regionoj de Jugoslavio.

Pri la organiza formo de Jugoslaviaj Fervojoj kaj la memadministra sistemo regiona ni aŭdis tre kompetentan paroladon kun interesa kaj vigla diskutado, elokvente gvidita de Gvozden Sredić, malgraŭ lingva diverseco inter la slovena kaj la serbokroata lingvoj . . . — Amatoraj filmoj plenigis alian vesperon kaj plej longe daŭris la karnavala vespero kun premiado de la plej bonaj maskoj kaj kun tombolo kun multegaj gajnaĵoj.

Ekskurso aŭtobusa kondukis unue al la

fama skifabrika ELAN en Begunje, proksime de Lesce. Promenado tra la fabrikejoj montris tre interesajn detalojn pri la konsisto de modernaj skioj, pri la evidentaj diferencoj inter flugskioj kaj longdistanco-skioj, pri la konstruado de boatoj el plasto kaj pri la laborkondiĉoj de la homoj tie. Malpli agrabla estis la vizito al „muzeo“ samloka, kiu fakte estis karceroj por malliberigitaj dum la milito . . . En proksima vilaĝo Vrba ni vizitis la naskiĝdomon de slovena poeto France Preseren (1800 – 1849), renoma lirikisto. La ekskurso finiĝis per vizito de la urbo Bled kaj la samnoma lago, tre egraba tago.

Anstataŭ lingva konkurso ĉi-jare la partoprenintoj ricevis demandofoliojn kun 23 demandoj pri Jugoslavio, pri IFEF kaj pri vintra sporto. La lasta punkto donis eblecon skribi kelkajn frazojn pri tri proponitaj temoj – la ĵurio multe ŝvitis ĝuste pro tiu ero. La skiad-konkurso okazis por la disciplino longdistanca skiado kaj alpeca skiado kun pordegoj, aparte por diversaj lertecoj. Tiel la organizantoj povis disdoni amason da premioj kaj dokumentoj. Bonvena novaĵo: anstataŭ pokaloj oni disdonis regiontipajn ceramikajn fojn! Kaj la IFEF-premio, kiun gajnis Denise Happi Fosso, konsistis el kompleto de 6 stanaj brandoglasetoj, kiuj dum tiu vespero multfoje devis esti plenigataj . . .

Dankon al la organizintoj, precipe al Jovan Mirković, kiuj faris sian eblon por kontentigi la sennombrajn informpetojn kaj dezirojn. Venontjare estos la francaj geamikoj, kiuj invitos al IFES.

Ritt

Ĉiujare denove . . .

Regule en printempo nia BULTENO raportas per kelkaj linioj pri la Linz'a Esperanto-Skisemajno, aranĝo kiu seninterrompe okazas jam de dekdu jaroj samloke. Ĉiujare denove oni persvadas la vaste konatan „patron de la skisemajnoj“ kaj vole-nevole li planas kaj organizas por duoncento da homoj vintran semajnon. Kio do allogas ilin, jaron post jaro, al Strussing-domo? Ĝi situas en alteco de ĉ. 1600 m, staras tute solece sur montplataĵo; kelkaj malnovaj ĉambroj eĉ ne havas duŝon, ne ĉiam estas varmaj kaj ne komfortaj. Piedirantoj tie nur trovas malmultajn eblecojn por migri kaj

longdistanca skiado tute maleblas. Johano Geroldinger neniam varbis por tiu aranĝo, neniam distribuis aliĝilojn kaj neniam aranĝas sian semajnon samtempe kun IFES, sed ĉiun jaron denove li havas malfacilaĵojn havigi sufiĉe da litoj al la alvojaĝintoj. Ili tutsimple venas, ĉar la etoso kaj la harmonio reganta en tiu rondo ne estas komparebla, ĉar unika.

Ĉi-jare la vetero ege favoris nin: kristal-neĝeroj brilegis sub sunradioj, kelkmatene arboj kaj arbustoj estis superŝutitaj de blanka „sukero“, ĉar prujno desegnis admirindajn konturojn kontraŭ la lazurblua firmamento. Kvankam la neĝo havis revan kvaliton por la skianto, ili jen kaj jen staris senmove, prisorĉitaj de la fabela bildo, kiun kreis patrino naturo.

Inter la amikaro estis Walter, majstro sur la akordeono. Li multe instigis nin vespere kanti, danci, ŝunkli kaj kompreneble karnavali. Ni vidis diversajn filmojn kaj iun vesperon granda parto de ni entreprenis noktan migradon al Naturamika domo „Proksch-Haus“ por aŭdi kaj vidi interesan diaprelegon pri Sudameriko . . .

Ĉiutage je la 17a ĝojige granda nombro da lernemuloj kunvenis por partopreni Esperanto-kurson. La intereso kreskis tiel, ke necesis dispartigi la kursanojn al du paralelaj rondoj. Diligente kaj fervore ili lernis kio ĝojigis la instruantojn, Elisabeth kaj Gernot Ritterspach. Libervole ĉiuj kursanoj partoprenis je la lasta tago lingvokonkurso. Premioj por la gajnintoj, Margret Kärcher kaj Ingrid Wallmann, estis valoraj E-libroj. Ankaŭ la gajnintoj de kostumita skiado duopa ricevis premiojn.

Sabato, la 21an de Februaro, oni adiaŭis, adiaŭis de Strussing-domo, adiaŭis de Johano kaj Melitta Geroldinger. Ĉiuj dankis al ili tutkore pro denove neforgesebla semajno. E. R.

El la grupoj

Essen / Dortmund:

Im Auslandsinstitut der Rheinisch-Westfälischen Auslandsgesellschaft e. V., 4600 Dortmund 1, Arndtstr. 30 A werden im 1. Halbjahr 1981 u. a. folgende Esperanto-Darbietungen geboten:

11. 5. Schienen verbinden die Länder – Esperanto die Völker, Diskussion mit Günter Bartz,
25. 5. Eine Eisenbahnreise durch Polen. Diavortrag von Werner Wölke, Essen, über seine Eindrücke von der Polnischen Staatsbahn.
22. 6. Internationale Jugendkontakte durch Esperanto. Der Leiter der örtlichen Esperanto-Jugend wendet sich an Jugendliche.

Seit 30. 1. 1981 werden Anfänger freitags von 20.00 bis 21.30 Uhr in einem Grundstufenkurs in der Internationalen Sprache unterrichtet.

Frankfurt/Main

La 24-an de Januaro 81 la distriktkomisiito havis okazon, informi pri la internacia lingvo en sia loĝkomunumo Steinbach/Ts. Speciale kunvenis estraranoj kaj membroj de la tiea vira kaj virina floro.

Partoprenis ankaŭ 2 esperantistoj el Jugoslavio kaj Rumanio.

Oni interalie prezentis malgrandan super-rigardon pri Esperanto-literaturo, -gazetoj, -vortaroj ktp.

E. Kiefer emfazis, ke pere de Esperanto oni povus i. a. favore kontaktiĝi kun enloĝantoj de la nova ĝemeliĝa urbo St. Avertin (proksime de Tours) en Francio, kie jam ekzistas Esperanto-klubo.

La partoprenantoj de la inform-vespero estis impresitaj pri la eblecoj de la interkompreniĝo per Esperanto, sed por ebla Esperanto-laborrondo nur anoncis sin 1 persono.

Bericht über die Jahresversammlung am 17. 1. 1981 in Kassel

Der Bezirksbeauftragte Egon Kiefer hatte zum 17. Januar 1981 zur Jahresversammlung 1980/81 nach Kassel eingeladen.

Im Nebenzimmer der Betriebsküche begrüßte der Leiter der Eisenbahner-Esperantogruppe Kassel Bode die zahlreichen Sprachfreunde. Die GdED, die GDBA und das BSW hatten entsandt:

vom GdED-HV, Herr Schuster
 von GdED-Bzl, Herr Eichhoff
 von GDBA-Bzl, Herr Müller
 vom BSW-Ortsverband, Herr Christmann

Eine besondere Note erhielt dieses Treffen durch die Anwesenheit des Hauptvorstandsmitgliedes der GdED und des Vorsitzenden der deutschen Sektion der Vereinigung europäischer Eisenbahner, Herrn Döpfer. Erstmals in diesem Kreise war auch die junge Esperantorunde Kassel unter Führung von Herrn Wiegand, der die Größe des Stadtparlaments und des Oberbürgermeisters der Stadt Kassel überbrachte. Die anwesenden Vertreter der o. a. Organisationen hoben die Bedeutung des Esperanto für die Völker-Verständigung hervor. Herr Schuster betonte vor allem, daß bei den internationalen Gremien die hohen Kosten für die Simultanübersetzungen in verschiedene Arbeitssprachen enorme Gelder verschlinge. Bis heute habe jedoch keine Prüfungsinstanz diese riesigen Ausgaben beanstandet. Die ständig steigenden Kosten müßten früher oder später zur Einführung einer für alle Sprachgruppen annehmbaren Einheitssprache führen. Das seit langem bewährte Esperanto bietet sich geradezu an.

In seinem Jahresbericht erwähnte Egon Kiefer die zahlreichen Aktivitäten und Veranstaltungen des Jahres 1980: private gegenseitige Besuche mit ausländischen Sprachfreunden, regionale Treffen, Ferienwochen, eine internationale Eisenbahner-Esperanto-Skiwoche, die Jahresversammlung der deutschen Eisenbahner-Esperantisten in Oberkirch im Oktober 1980 und vor allem den IFEF-Kongreß in America (Niederlande). Einige Eisenbahner-Esperanto-Kollegen unseres Bezirks arbeiten schon seit längerem an der Schaffung eines Eisenbahn-Esperanto-Fachwörterbuches (Grundlage: UIC-Wörterbuch) mit. Ein erfreuliches Ergebnis zeigt die im Jahre 1978/79 gestartete Werbeaktion.

Nach dem gemeinsam eingenommenen Mittagessen zeigte Herr Barnickel, Ffm, einen esperantosprachigen Film über Regensburg, die Stadt des nächsten IFEF-Kongresses. Die farbenfrohen Bilder und der begleitende Text verfehlten ihre Wirkung nicht. Frau Kruse, die Sekretärin des Kongresses, gab anschließend noch wichtige Erläuterungen zum geplanten Kongreßablauf.

Nach Kaffee und Kuchen hielt der Leiter der Eisenbahner-Esperantogruppe Kassel ein Referat über den genialen Sprach-

schöpfer und Menschenfreund Dr. Zamenhof.
Die anschließende Aussprache führte zu
einer angeregten Unterhaltung.

Nekrologoj

La 3an de Februaro 1981 mortis post
longa malsano nia longjara fidela
kolego kaj amiko

Anton Weber, lokomotivestro
Friedrich-Ebert-Strato 6,
8090 Wasserburg.
Kolego Anton Weber lernis Esperan-
ton jam 1946 aŭtodidakte en Wasser-



burg, kie li deĵoris. Li fariĝis membro
de GEFA kaj IFEF tuj post la fondiĝo
de tiuj organizoj kaj ne mankis en
IFEF kongresoj kaj GEFA jarkun-
venoj, se la deĵoraj devoj aŭ lia san-
stato tion permesis.

Ni ne forgesos nian fidelan amikon
kaj al liaj familianoj ni esprimas
nian sinceran kondolencon.

Aldone mi devas informi, bedaŭrinde
kun longa malfruiĝo, pri la morto de
nia kolego

Werner Sturm

el Kempten/Allgäu, en Majo 1980.
La informo atingis nin monatojn post
lia forpaso kaj la familio ne respon-
dis al pluraj leteroj.

Kolego Sturm estis multjara membro
en niaj asocioj kaj dum pluraj jaroj
ankaŭ distrikta komisiito de distrikto
Munkeno.

Ni konservu lin en nia memoro.

GEFA-Estraro

El letero bonkora

Kortuŝa estas, kion travivis staciestro
Heinz Kohler en Ulm.

Li estis helpinta al dekjaraĝa knabino
dum la elvagoniĝo. La danke ridetanta
infano, kiel oni poste eksciis, estis
surdmuta kaj pro tio akceptita de la
Ruĝa Kruc-Misio. Malmultajn tagojn pli
poste la du denove renkontis sin reciproke
sur la kajo. Kaj jen, la brile ridetanta
infano mangestis la fervojiston al si,
malfermis sian mansaketon kaj donacis
al la afabla fervojisto arakidon.

El „Blickpunkt“ 5/80
Fritz Busse

PROSPEKTOJ

Aperis nova prospekto de Aachen
(FRGermanio) kun tekstoj en Esperanto
kaj kelkaj aliaj lingvoj (i.a. la hebrea).
Petu ĉi tiun koloran kaj tre instruan
prospekton ĉe: Verkehrsverein Bad Aachen,
Bahnhofplatz 4, 5100 Aachen.

La Ministro de Eksteraj Aferoj en Oslo
eldonis prospekton esperantlingvan kun
la titolo: „Rigardo al Norvegio“. La registra
oficejo presigis kaj senpage disendis tian
propagandilon. Ĝi pritraktas diversajn
vidpunktojn de la lando, popolo, historio,
kultura vivo, edukado, ekonomio, komerco
ktp.

Petu la prospekton al:
Norvega Esperantista Ligo,
Boks 942, Oslo-1. Norvegio.

Specialajn ofertojn por fotoamatoroj
prezentas prospekto eldonita de foto-firmao
Leitz kaj Airtours internacia. Temas pri
fotovojaĝoj al pitoreskaj regionoj de la
mondo. Fakuloj de Leitz
akompanas kaj konsilas la vojaĝantojn, eĉ
oni povas pruntepreni foto-aparatojn.
Petu la prospekton (germanlingvan) ĉe:
Airtours International, Adalbertstr. 44-48,
6000 Frankfurt a. M.

Neue Mitglieder

Wir begrüßen in unserer Mitte Gerhard
Pohl, Bf Dorsten und Rosita Weber,
BD Essen, die vom Bba Essen,
M. Retzlaff, erworben wurden.

Redaktfino por n-ro 3/81 estas la 10.6.1981